# NIA PONTO



Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
48005-BILBAO (Hispanio)
Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (jesusmiguel.garcia@ehu.es)

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 619.694.683 (Iciar)
☎ 658.709.087 (Jesús)
esperantobi@gmail.com

TTT-ejo: esperantobilbao.tk

**Jar-kotizoj**: Normala: 30 €. Speciala: 15 €. Familia: 45 €.
**BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550**

**MAJO/OKTOBRO 2015** **Nro. 104 (3/15)**

**LOKE ...**

## ESPERANTO-TAGO.

Okaze de la “E-tago”, la 26-an de julio, la Grupo Esperantista de Bilbao dissendis la cxi-suban trilingvan sciigon pere de la reto. Kelkaj eraretoj en la teksto estas neintencaj.





La proksima dimanco ni festos la Esperanto-Tago, tiu estas, la datreveno de la unua eldono de la libro "Lingvo Internacia", verkita de la Doktoro Esperanto (alinomo de L. L. Zamenhof). Ĝi okazis la 26-an de julio 1887, do jam pasis 128 jaroj!

Datorren igandean

Esperantoaren Eguna ospatuko dugu, egun horretan argitaratu zen-eta "Nazioarteko Hizkuntza" liburua, Esperanto Doktoreak idatzia (LL Zamenhof-en ezizena). Zehatz-mehatz, 1887ko uztailaren 26an, beraz, 128 urte jazo dira!




El próximo domingo se celebrará el Día del Esperanto, es el aniversario de la primera edición del libro "Lengua Internacional", escrito por el Doctor Esperanto (sobrenombre de L. L. Zamenhof). Tuvo lugar el 26 de Julio de 1887, ¡así que ya han pasado 128 años!

## KRISTNASKA LOTERIO.

La kutima loterio kristnaska estos preta je la dua duono de oktobro. Cxia helpo por vendi gxin estos bonvena. La cxijara numero estos **80468**.

## BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA EN 2015.

Infanlibro de la jaro.
Eldonejo Erroteta pro la libro _Usoa venis fluge kaj Sola kaj senvosta_ de Patxi Zubizarreta, tradukita de A. Arana.
Partoprenis 4 verkoj de 3 eldonejoj el tri landoj.

*(Gazetaraj Komunikoj de UEA. N-ro 582. 2015-07-30)*

## APROBITA LA NOVA STATUTO DE LA GRUPO.

La 18an de septembro ni ricevis leteron de la Euska Registaro, kie oni certigis la aprobon de la nova statuto de la Grupo, tiel kiel ni redaktis gxin. Dato de la aprobo estas la 8-a de julio.

## Eŭska-Esperanta/Esperanta-Eŭska Vortaro.

La 17-an de oktobro okazis la oficiala prezento en Esperantio de la Eŭska-Esperanta/Esperanta-Eŭska Vortaro fare de ties aŭtoro Aitor Arana. Eŭska Esperanto-Asocio speciale kuraĝigis esperantistajn geamikojn ĉeesti la eventon, kiun oni okazigis en Loiolo (Aspejtia), kvartalo kie situas la fama baziliko.

Okaze de la prezento la aŭtoro kaj eldonanto ofertis specialan rabaton al la ĉeestantoj: 20,00 eŭroj anstataŭ 35,00.

*(Nikolas Xil Carvalho. 02/10/2015)*

## VENONTAJ E-ARANĜOJ.

**30 okt-01 nov.** 19-a Andaluzia Kongreso de Esperanto: “Esperanto kaj Universitato”. Jerez de la Frontera (Cádiz).

**30 okt-01 nov.** 37-a Kataluna Kongreso de Esperanto en Mataró, kun la partropreno de István Ertl, Jorge Camacho kaj Zhou Macfoulia inter aliaj. Inf.: Kataluna E-Asocio info@esperanto.cat

**30 jun-04 jul. 2016**. 75-a Hispana Kongreso. Herrera del Duque (Ekstremaduro).

**16-23. jul 2016**. 72-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) en Wrocław, Pollando.


**23-30 jul. 2016**. 101-a Universala Kongreso. Nitra (Slovakio).




**julio 2017**. Karavano al Seulo - Rusio-Koreio. Korea Esperanto-Asocio invitis UKon 102 de jaro 2017 en Seulo, Koreio. La Vojaĝo anoncas novan projekton, Karavanon al Seulo por partoprenantoj de planata kongreso. Laŭ anticipa plano ĝi itineros laŭ la fama Trasiberia fervojo (9298 km/ 4,607 mejla), la plej longa fervoja itinero en la mondo. inf.: La Vojaĝo.

**H.E.F.**

## JAM EBLAS ALIĜI AL LA VENONTA HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO.




Kiel ni informis en pasinta Bitbulteno, la **75a Hispana Kongreso de Esperanto** estos celebrita la venontan jaron 2016 en la ekstremadura urbo Herrera del Duque, komence de julio. Nu, ni jam povas anonci novaĵojn. Estis publikigita la "Unua Anonco", la aliĝbulteno kaj la oficiala afiŝo de la kongreso, kiuj estos prezentataj en la *Movada Foiro* dum la Universala Kongreso de Lillo, en kiu HEF partoprenos.


Vi povas ilin legi kaj elŝuti en nia retejo. Eĉ eblas jam aliĝi al la Kongreso, montrante vian apogon al renkontiĝo kiu sendube fariĝos speciala. Ni baldaŭ disponos je reta aliĝa formularo, sed dume oni povas plenigi la aliĝbultenon kiun vi trovos en nia retejo.

Kaj se vi havas ajnan dubon aŭ sugeston, ne hezitu skribi al la organiza komitato ĉe la adreso kongreso@esperanto.es.

*(La Bitbulteno de HEF. Nro. 19. 24-07-2015)*

## RENKONTIĜOJ DE ESPERANTO EN ANDALUZIO KAJ EN KATALUNIO.

Post la somero ni ankoraŭ ĝuos plurajn ŝancojn partopreni esperantistajn renkontiĝojn ene de la hispaniaj landlimoj, eĉ foje samtempe.




Inter la 30a de oktobro kaj la 1a de novembro de tiu ĉi jaro okazos en Jerez de la Frontera (la patrujo de la fama vino ŝereo, en la sudokcidento de Hispanio) la 19a Andaluza Kongreso de Esperanto. Oni esperas tre interesan renkonton, kiu krom ebligi ĝui la esperantan etoson kaj la belecon de tiom altira urbo, pritraktos interesplenan kaj aktualan temon: "Esperanto kaj Universitato". Ĉiuj informoj estas konsulteblaj en la retejo https://andaluziaesperanto.wordpress.com/. Ni atendas vin ĉiujn tie.

En la samaj datoj disvolviĝos en Mataró, ne malproksime de Barcelono, la 37a Kataluna Kongreso de Esperanto, kun la temo "Ŝancoj de enmigrado". Pliaj informoj kaj aliĝaj formularoj estas troveblaj en la adreso http://www.esperanto.cat/kongresoj/2015/

kaj jam antaŭe, inter la 3a kaj 10a de oktobro, okazos ankaŭ en Katalunio, en Roses, en la konata *Costa Brava*, la tradicia *Internacia Semajno de la Kulturo kaj Turismo*, spri kiu eblas peti informojn ĉe la retpoŝta adreso luis_serrano@ya.com.

*(La Bitbulteno de HEF. Nro. 19. 24-07-2015)*


# AMASIĜAS LA ALDONOJ AL NIA BITOTEKO.

La aldono de materialo al nia Bitoteko http://bitoteko.esperanto.es ne ĉesas. Ni alproksimiĝas al la 5.000 eroj, danke al la senlaca kaj dankinda laboro de nia grupo da tre volontaj aktivuloj. Jen kiel ekzemplo, du antaŭnelonge enbitotekigitaj historiaj dokumentoj: la Jarlibroj de hispanaj esperantistoj de la jaroj 1906 kaj 1957. Indas mencii la ĉeeston en tiu ĉi lasta de kelkaj homoj ankoraŭ vivantaj kaj aktivaj, eĉ post preskaŭ sesdek jaroj! Gratulon kaj dankon al ili.

Vi ankaŭ povas nun legi en Bitoteko romanon de la kataluna verkisto Manuel de Pedrolo. Temas pri "Fia Ludo", tradukita el la kataluna "Joc brut" fare de Guillem Portell.

*(La Bitbulteno de HEF. Nro. 19. 24-07-2015)*

# NOVA UNIVERSITATA LIBRO PRI ESPERANTO.




Oni ĵus eldonis libron pri Esperanto, en la angla lingvo, ĉe la eldonejo de la universitato de Pensilvanio. Ĝia titolo estas "Esperanto and Its Rivals, the Struggle for an International Language" (*Esperanto kaj ĝiaj rivaloj, la lukto por internacia lingvo*). La aŭtoro estas Roberto Garvía, profesoro de Sociologio de la universitato Carlos III de Madrido. En la libro, Garvía analizas la movadojn por internaciaj lingvoj, fokusigante sian atenton en la malsamaj strategioj sekvitaj de la partianoj de Volapuko, Esperanto kaj Ido, la penoj faritaj por disvastigi tian solvon kaj la malfacilaĵoj renkontitaj. Garvía verkis ĝin ĉefe dum sia estado en Usono kiel profesoro de la katedro "Princo de Asturio", kiun la hispania registaro sponsoras en la universitato Georgetown.

*(La Bitbulteno de HEF. Nro. 18. 25-06-2015)*

# Esperantlingvaj elektoafiŝoj en Barcelono.







La bildoj en ĉi tiu artikolo montras balotafiŝojn, videblajn en la stratoj de Barcelono. La vizaĝo estas tiu de politikisto, kiu fariĝis urbestrino de Barcelono post la municipaj balotoj okazintaj la dimanĉon 24-an de majo. Ŝi nomiĝas Ada Colau (elp. Kolaŭ') kaj la listo per kiu ŝi kandidatis nomiĝas "Barcelona en Comú" (mallonge BeC), esperantigebla per, proksimume, "Barcelono kolektive".

*(Prenita el artikolo de Toño del Barrio en « Libera Folio ». http://www.liberafolio.org/esperantlingvaj-elektoafisoj-en-barcelono)*

## GRATULON AL ANA MANERO.

"Diplomon pro elstara agado oni aljuĝis al Ana Manero, Birthe Lapenna, Chuck Smith, Doi Chieko, Francisco Veuthey, Géza Kuruch, Ilona Koutny, Ĵak LePuil, Laszlo Szilvasi, Richard Delamore, Rogerer Pavinski kaj Wang Chongfang." http://www.liberafolio.org/la-100-a-universala-kongreso-inaugurita.

*(Jorge Camacho. 28/07/2015)*

## GRATULMESAGXON AL BITOTEKO DE HEF.

En komuniko de UEA rilate al diversaj agadoj aperas gratula mesaĝo pri la Bitoteko de HEF. Sama informo aperis antaŭ kelkaj tagoj en informoletero de la novaĵservo Ret-Info, sekve al kiu oni ricevis ĉe HEF plurajn gratulleterojn el la tuta mondo.

Denove dankon kaj gratulon al la skipo de la Bitoteko, kiu faras la servon ebla kaj tiom aprezata.

*(José Antonio del Barrio, Prezidanto de HEF. 13/09/2015)*

**Bitoteko kun gazetoteko**

Hispana Esperanto-Federacio funkciigas interretan bibliotekon *Bitoteko* - kolektejon de elektronikaj versioj de multaj kaj interesaj Esperantaj literaturaj materialoj. La biblioteko havas subfakojn (literaturo, tradukoj, infanlibroj, ktp.), signifan ne nur en hispania, sed ankaŭ en internacia nivelo.

Subfako 'Gazetoteko' enhavas 124 legeblajn kaj elŝuteblajn Esperanto-gazetojn, inter ili interesaĵojn kiel *La Praktiko, Bulteno de ATEO (ateistoj), Esperanta Numismatiko, Familia Esperanto* kaj multaj aliaj. La plej freŝa kolekto en Bitoteko estas la **Kongresaj Kurieroj**, t.e. la ĉiutagaj informiloj, eldonitaj dum la Universalaj Kongresoj. En la kolekto troviĝas **ĉiuj kurieroj de ĉiuj UKoj** ekde 1908 ĝis 2015 –ĉiuj ili estas legeblaj kaj elŝuteblaj en formato PDF. Gratulon al Roland Rotsaert, la Fondaĵo Vanbiervliet kaj la zorgantoj de Bitoteko pro tiu sindona laboro kaj kunlaboro! Aliru la bitotekon: http://bitoteko.esperanto.es:8080/jspui/

## LUDOJ EN ESPERANTO.

Mi trovis ke oni anoncis la lanĉon de ludo por androjdaj sistemoj, disponebla ankaŭ en Esperanto: https://twitter.com/imagu_vdg/status/637384381582168064

Ĝi aperas la 1an de septembro en GooglePlay, kaj la kreantoj nomiĝas "Imagu" (tiel), kaj venas el Madrido. Ĉu iu konas ilin?

*(Toño del Barrio. 31/08/2015)*


## AFEROJ DE LA RETO.

Memoru ke, kiel ni informis pasintnumere, nun ekzistas grupo de Esperanto en meetup, socia reto kiu celas renkontigi homojn de la sama urbo kun samaj interesiĝoj: http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta. Krome, ni povas informi pri bona novaĵo: nia grupo senlimiĝis kontraŭ sama kosto. Aliĝu kaj konfirmu vian ĉeeston aŭ aktivigu la grupon aŭ anoncu aliajn eventojn proponitajn de vi, ktp.

*("Nia Vocxo". Organo de Madrida E-Liceo. 01/09/2015)*

## TRA LA MONDO …

## NOVA ELDONO DE “CENT JAROJ DA SOLECO”.




"Cent jaroj da soleco" de la kolombia Nobel-premiito Gabriel García Márquez denove haveblas. La unua eldono de la Esperanta traduko de Fernando de Diego aperis ĉe Fonto en 1992. La dua eldono aperis ĵus ĉe Mondial. La romano estas n-ro 27 en la Serio "Oriento-Okcicento". Mendu ĉe UEA.

*(La Bitbulteno de HEF. Nro. 18. 25-06-2015)*

## Nova Direktoro por UEA.

Frue en la komitata kunsido en la centa Universala Kongreso estis publike anoncita la decido de la Estraro de UEA pri la nova Ĝenerala Direktoro. La decido favoris al Veronika Poór el Hungario. Tiu decido ja bezonis kelkajn tagojn post la intervjuoj, pro la alta kvalito de ĉiuj prezentaĵoj. La Asocio kore dankas al ĉiuj kandidatoj pro la proponoj kaj gratulas la sukcesinton.

Veronika Poór ekoficos ekde la unua de januaro, 2016. Sekvos ĉirkaŭ dumonata transira fazo en kiu la nuna kaj estonta Direktoroj kunlaboros pri la transdono de taskoj kaj post tio Veronika formale ricevos la oficon.

Jen konciza resumo pri la oficonto:

Veronika Poór naskiĝis en 1983. Ŝi doktoriĝis pri fiziko, en la kampo de nanoteknologio. Ŝi kunfondis la retradio-kanalon Muzaiko kaj ŝi estas estrarano de TEJO respondeca pri Aktivula Trejnado, Eksteraj Rilatoj, Homaj Rimedoj kaj Scienca kaj faka agado. En tiu rolo interalie ŝi verkis kaj kunverkis kvin retajn trejnadojn de TEJO, ŝi estis elektita por la Konsila Konsilio pri Junularo de la Konsilio de Eŭropo, ŝi superrigardis la kreadon de nova enkonduko por novaj membroj kaj ekorganizis Sciencajn Prelegsesiojn. Aldone ŝi ankaŭ grave kontribuis al la verkado de sukcesaj subvencipetoj de TEJO.

*(Estrara Komuniko: EKO 2015-34 sendita el Lillo, la 31an de julio. EKO-UKO numero 7)*

## Surprizoj dum la UK en Lillo.

Ĉe la fino de la ferma ceremonio de la Universala Kongreso en Lillo, okazis nekutima kaj neplanita programero: Peter Baláž gvidanto de E@I, prezidanto de LKK de la sekvajara UK petis surscenejen sian koramikinon Dorota Rodzianko, kaj tie, publike petis ŝin iĝi lia edzino!

Mallonga filma registraĵo pri la fianĉa demando estas videbla ĉe: https://www.youtube.com/watch?v=WAqtaA_eAhk

*("Lingvo-Studio / Szilvasi Laszlo, LS" <ret-info@eventoj.hu>. 02/08/2015)*

# MANIFESTACIO KAJ JUĜPROSECO KONTRAŬ LA URBA REGISTARO POR ESPERANTO.

Mesaĝo en la socia reto VKontakte invitas Vin partopreni en la juĝproceso kontraŭ la registaro de urbo Kazanj, en la ĉefurbo de Tatara Respubliko, Rusio – kiu forigis kaj ŝanĝis la nomon de la strato Esperanto: http://vk.com/topic-48182_32762766 Laŭ la Esperanta novaĵretejo http://www.e-novosti.info kvar civitanoj de la urbo Kazanj lanĉis juĝproceson kontraŭ la urba administracio, ĉar laŭ la asertoj la nomŝanĝo ne konformas al la valida regularo de la urba toponimia regularo.

En la tuta Rusio ekzistis strato Esperanto nur en unu urbo, Kazanj, sed kiel konate, antaŭ 1 monato la urba administracio decidis renomi la straton je la nuna prezidento de Kazahio Nursultan Nazarbajev.

La valida urba leĝo malpermesas nomi stratojn laŭ vivantaj personoj, krome la ŝanĝojn devus formale subteni min. 10 personoj de la koncerna komisiono, sed en la realo subtenis ĝin NUR ties prezidanto. La procesintoj postulas deklari la nom-ŝanĝon nevalida.

Proteste al tiu nomŝanĝo esperantistoj de Kazanj organizis demonstracion, pri kiu rapostas filmista teamo de la kanalo Azatutyun ĉe:
https://www.youtube.com/watch?v=dFj3oVQnoAE

La unua sesio de la juĝeja proseco okazos la 12-an de aŭgusto.

*(Lingvo-Studio / Szilvasi Laszlo, LS. 06/08/2015)*

